

AMO SUB LUNLUMO

vortoj/muziko: E. Rovere (Manŭel)

Ĉu vi jam dormas sub mola littuko?

Do, ne rimarkis vi ĉi tiun plaĉan nokton.

Eble vi sonĝas aŭ, orelostreĉe,

atendas min samkiel ofte, pasintece.

Dum mia longa malĉeest' mi ĉiam pensis nur pri vi:

bonvolu nun ne lasi min plu sola tie ĉi.

Ho, karulino, venu kun mi sub lunlumon.

Profitu je ĉi tiu romantika hor'.

Retrovu ni la fonton de l'vera vivtrezoro:

senfine por ni brilos Amo sub lunlumo.

Ĉu vi memoras nun pri tiuj tempoj,

kiam ni planis formi belan familion;

kiam korŝire devis mi elmigri,

por perlabori monon, realigi revojn.

Finiĝas mia forestad', plename mi revenas nun.

Ne atendigu min plu, baldaŭ jam vekiĝos sun'.

Ho, karulino, venu kun mi sub lunlumon.

Rigardu, fleksgenue nun mi petas vin.

La nura amo estas vi, vi aŭ neniu alia.

Ni ĝoje realigu amon sub lunlumo.